# ESPERANTO EN MARCHE




## ni faris
EXCEL'LANGUES EN TENNEVILLE
TENDUMADO DE LA VERDAJ SKOLTOJ
ZAMENHOFFESTO EN LESSINES

## ni faras
JES (JUNULARA E-SEMAJNO)
KURSOJ POR KOMENCANTOJ

## ni faros
ESPERANTO-STUDSEMAJNFINO
GEBENELUKSA KONGRESO

**Revue trimestrielle belge**

**HIVER 2024 - N°4**

esperanto Wallonie

# Informations
# Informoj

L'asbl Espéranto Wallonie (anciennement APE) a pour objet la diffusion de l'espéranto, langue auxiliaire internationale, conçue dans le but de faciliter la communication entre locuteurs de langues maternelles différentes.
La V.Esp-o (Espéranto Wallonie) agit en Wallonie directement ou en soutenant les groupes locaux, les tables de conversation et toute initiative individuelle, avec le support de la FWB.
Ses principales activités sont l'organisation d'événements et de formations, la participation à des festivals, le support des Verdaj Skoltoj, des groupes locaux et des tables de conversation.

## Comment soutenir nos actions ?

- Participez à nos événements
- Contribuez à cette revue
- Rejoignez notre équipe
- Devenez membre
- Offrez-nous un café via un don mensuel de 3 € ou plus sur notre compte avec la mention « don »

**Avec le soutien de** FÉDÉRATION WALLONIE-BRUXELLES

## Devenir membre / Membriĝi

**MEM** (membre > 25 ans + revue) 30 €
**JUN** (membre < 25 ans + revue) 12 €
**FAM** (cohabitant pas de revue) 5 €
**REV** (abonnement revue seule) 12 €
À payer sur le compte d'Espéranto Wallonie **BE33 5230 8132 1946** avec les mentions correspondantes. Voir sur le site www.esperanto-wallonie.be
E-mail : esperanto.wallonie@gmail.com

## Nos partenaires / Niaj partneroj

- International : Universala Esperanto Asocio (UEA) Rotterdam et SAT (Paris). Point de contact, Claude GLADY : 071 644 916 cglady@arcadis.be
- Belgique : Belga Esperantista Federacio (BEF). La coupole du mouvement. www.esperanto.be/bef Yves NEVELSTEEN 0472 106 086 yves.nevelsteen@gmail.com
- Flandre : Flandra Esperanto-Ligo (FEL) 03 234 34 00 www.esperanto.be info@fel.esperanto.be
- Bruxelles : Esperantista Brusela Grupo (EBG). Nikolao de BUYL : nikolao@esperantobruselo.org 0478 382 981 www.esperantobruselo.org
- Verviers (Senlime) : Jean-Marie JACQUES 087 330 292 jacques@senlime.org
- Jeunes : Verdaj Skoltoj, asbl. Scoutisme sans frontières en espéranto. info@verdajskoltoj.net Valère DOUMONT 0485 517 552 www.verdajskoltoj.net

Photo sur la couverture : La fête Zamenhof à Lessines. Photo de Lode Van de Velde.

## Contenu / **Enhavo**

Novaĵoj el Esperantujo - 4
Excel'Langues - 6
La UK en Ĉeĥio - 7
Beneluksa Kongreso - 8
Movado sen Nomo - 10
Kotizoj - 11
Tendumado de la skoltoj - 12
Filmoj en Esperanto - 14
UK en Tanzanio: raporto - 16

### Colofon / **Kolofono**

Ce magazine est édité par l'asbl Espéranto Wallonie - Rue de la Terre Franche, 33 - 5310 Longchamps.
Rédacteur en chef : Jean Annet
Rédaction et mise en page : Yves Nevelsteen
Imprimé par Lebrun Communications à Strée



# Éditorial
# **Antaŭparolo**

Saluton al ĉiuj,

Voici venir notre dernier numéro de l'année, avec ses bilans et ses projets. Nous venons de fêter très agréablement la Zamenhofa Festo à Lessines (notre photo de couverture) et nous nous préparons déjà pour notre autre grand évènement: le Beneluksa Kongreso avec les Allemands en octobre prochain. D'ici là il y aura la Studsemajnfino à Ypres en février (page 19), le Congrès Universel à Brno en août (attention les dates ont changé), le festival JES qui se passe maintenant en fin d'année, PEKO avec les Verdaj Skoltoj et tant d'autres.

Comme tous les ans nous vous demandons de renouveler votre cotisation (page 11). Celle-ci est passée cette année à 30 euros. Je rappelle que cette cotisation nous permet d'organiser les différents événements et également de soutenir la participation des jeunes à ces événements.

Au nom de V.Esp-o (Valona Esperanto-asocio), je vous souhaite à toutes et à tous une très belle nouvelle année 2025 avec tous nos espoirs qu'elle sera plus paisible et sereine que la précédente.

*Jean ANNET*

# Le monde de l’espéranto

# Novaĵoj el Esperantujo

## Rakontoj por Esperantujo

Rakontoj por Esperantujo estas libera kaj senpaga malferma eduka rimedo por kreskigi la legoscion kaj la lingvolernadon hejme, lerneje, kaj komunume. Ĝi provizas 40 rakontojn el la Afrika Rakontolibro kun tekstoj kaj sonregistraĵoj, en Esperanto kaj en aliaj lingvoj. Partoprenu kaj ĝuu!

https://rakontoj.net

## Kongresaj Kurieroj de la Virtuala Kongreso

Okazis antaŭ nelonge la 5-a Virtuala Kongreso de UEA. Dum la Universalaj Kongresoj de Esperanto ekzistas jam la multjara tradicio eldoni Kongresajn Kurierojn. Ĉi-jare ankaŭ la 5-a Virtuala Kongreso ĝuis sian Kongresan Kurieron, *La Flamo de Esperanto*. Ĉu vi scias, ke eblas senpage elŝuti ĝin? https://vk.esperanto.net/2024/kuriero/ Dum la 109-a UK en Aruŝo aperis *La Voĉo de Kilimanĝaro*, kiun redaktis Adjévi Adjé. Ĉiujn 7 numerojn de la Kongresa Kuriero vi daŭre povas libere elŝuti en la retejo https://uk.esperanto.net/2024/kuriero

Bonan malkovradon!


Universala Esperanto-Asocio (en oficialaj rilatoj kun UN kaj Unesko)
La 5-a Virtuala Kongreso de Esperanto • 28 novembro – 1 decembro

**La Flamo de Esperanto**

27-a de novembro 2024, numero 1
Redaktas Dmitrij Ŝevĉenko kaj Anna Striganova

**Ni transprenas la torĉon kaj portas *La Flamon de Esperanto***

Dima Ŝevĉenko kaj Anna Striganova

Karaj legantoj, jen venas la 5-a virtuala kongreso de Esperanto. Ni, esperantistoj, memoros la jaron 2024, kiel la jaron, kiam okazis la unua Universala Kongreso en Afriko. Malgraŭ ĉiuj defioj, malgraŭ ĉiuj hezitoj, ĝi okazis sukcese.

*La Voĉo de Kilimanĝaro*, kiun brile redaktis Adjévi Adjé, estis la Kongresa Kuriero dum la ĉi-jara UK. Estas granda honoro transpreni de li la torĉon, kaj porti *La Flamon de Esperanto*, la flamon de la Espero el Afriko al la tuta mondo.

**La 5-a virtuala kongreso**

Jam kvinan fojon la virtuala kongreso por kelkaj tagoj donas eblon ĝui Esperantujon, ne lasante sian hejmon. Ni ĉiuj esperas, ke la 5-a VK estos same bunta, kiel tradicie buntaj estas ĉiuj VK. Vi, homoj el dekoj da landoj, faras ĝin tia per viaj kontribuoj, via partopreno, viaj demandoj kaj komentoj, viaj paroloj en babilejoj. Ne forgesu, ni ĉiuj faras la VK kune! Kaj ne hezitu sendi viajn impresojn al ni! Ni ĝojus publikigi en *La Flamo de Esperanto* viajn anoncojn kaj raportojn, viajn opiniojn, dumkongresajn kuriozaĵojn, eĉ bone kaptitajn de vi ekranfotojn!

Kia estos la virtuala kongreso ĉi-jare? Ni unuavice atendas de ĝi Esperantan etoson, etoson de amikeco, interkompreno, estimo kaj... scivolemo. Ni ja renkontiĝas ne (almenaŭ ne nur) por distri, sed por ekkoni kaj rakonti ion novan. Ni atendas ankaŭ belajn sciencajn kaj primovadajn prelegojn, diskutojn kaj virtualajn ekskursojn al la foraj partoj de nia planedo. Ni atendas kulturan programon kaj liberajn babiladojn. Kaj kion atendas vi, karaj?

*La Flamo de Esperanto* kaj aliaj kanaloj (kiel Telegrama grupo, paĝoj en la sociaj retoj, Gazetaraj Komunikoj de UEA ka.) akompanos vin dum la kongreso kaj ankaŭ post ĝi.

*La Flamo de Esperanto*, same kiel la pasintjaraj kurieroj, estas senpage elŝutebla. Vi rajtas libere disvastigi ĝin en sociaj retoj, lokaj kaj fakaj dissendolistoj kaj simple resendi al viaj Esperantaj amikoj.

**Ĝis la baldaŭa revido!**
**Ni ĝuu la kongreson kune!**

**Dum la 109-a UK aperis *La Voĉo de Kilimanĝaro*, kiun redaktis Adjévi Adjé. Ĉiujn 7 numerojn de la Kongresa Kuriero vi daŭre povas libere elŝuti en la retejo: https://uk.esperanto.net/2024**

Universala Esperanto-Asocio — La Flamo de Esperanto n-ro 1 | 1

## Rusaj hakistoj atakis Monaton

Komence de oktobro, rusiaj hakistoj atakis plurajn retejojn en Belgio. Inter tiuj troviĝas ankaŭ la retejo de la magazino Monato, kiu tiam estis nur intermite alirebla. Monato aperigis kritikajn artikolojn pri la rusia invado de Ukrainio.

Laŭ Paul Peeraerts, multjara kunlaboranto kaj ĉefredaktoro de Monato, la belgia ŝtata aŭtoritato pri reta sekureco telefone kontaktis la respondeculojn vendrede matene, atentigis pri la okazanta atako, kaj promesis poste doni pliajn informojn.

Krom la retejo Monato estis trafitaj kelkaj aliaj retejoj de amaskomunikiloj, sed ankaŭ ekzemple la retejoj de la flandria parlamento, la asocio por protektado de aŭtoraj rajtoj kaj la presista asocio.

– Ŝajne tio okazas nun en Belgio, eble ĉar ni ĵus liveris armilojn al Ukrainio. Laŭ la lastaj novaĵoj temas pri grupo kun la nomo NoName057. En ilia Telegramkanalo troviĝas: ni plu sendos DDoS-salutojn al Belgio.

Similaj atakoj okazis pli frue en aliaj landoj, kiuj subtenas Ukrainion en la milito.

La angla mallongigo DDoS signifas ”distributed denial of service”, en Esperanto foje nomata ”sufoka atako”. En la praktiko tia atako signifas, ke multaj komputiloj samtempe sendas grandan kvanton da petoj al la atakata servilo, kiu




tiel estas superŝarĝata kaj iĝas neatingebla.

Ofte la komputiloj, kiuj estas uzataj por la atako, estas kaperitaj sen scio de la posedantoj.

DDoS-atakoj estas relative primitivaj kaj sendanĝeraj. Por organizi tian atakon ne estas postulataj grandaj scioj, kaj la enhavo de la atakataj serviloj ne estas difektita. Post la fino de la atako ĉio denove funkcias normale.

*Fonto: Libera Folio*
*https://mallonge.net/hakistoj*

# Excel'Langues à Tenneville

# Multaj valonaj infanoj malkovris Esperanton

Excel'Langues propose aux élèves de 5e et 6e primaire de la Province de Luxembourg un festival d'ateliers ludiques animés intégralement dans une langue étrangère.

Chaque activité dure 40 minutes et se produit 6 fois sur la journée. Chaque groupe peut choisir 3 ateliers différents :

- cuisine
- sport,
- jeu de coopération
- environnement
- ateliers créatifs
- droits de l'homme, ...

Au total, des dizaines d'animateurs offrent chaque jour de nombreux espaces d'animation. Leur mission : « donner le goût des langues » aux enfants que ce soit en néerlandais, allemand, luxembourgeois, anglais, espagnol, japonais, bulgare et bien d'autres encore.

https://reseaulangues.be/4151/excellangues-2024




Espéranto Wallonie estis denove invitita al Excel'Langues en Tenneville (provinco de Luksemburgo) ĵaŭdon la 7-an kaj vendredon la 8-an de novembro 2024. Fulminstruis tie Valère Doumont, Eric Nemes, Alex Humet, Jean-Pol Sparenberg, Françoise Pellegrin kaj Jean Annet.

https://benelukso.eu/excellangues

# Congrès universel en Tchéquie

## Ĉu vi iros al la UK en Ĉeĥio?

UNUA BULTENO

BRNO, ĈEĤIO
26-a de julio - 2-a de aŭgusto 2025

KONGRESA TEMO
Esperanto kaj teknologioj
kiel pontoj de paco kaj konfido inter la popoloj




*Ĉiujare okazas en alia lando la Universala Kongreso de Esperanto de Universala Esperanto-Asocio. Estas kulturfesto, tutmovada forumo, turisma festo kaj laborkunveno de la organoj de UEA kaj de aliaj Esperanto-organizaĵoj.*

### Burgoj kaj kasteloj

Jarcentoj da kulturaj mirindaĵoj atendas vian malkovron. Brno apartenas al regiono Suda Moravio, kun la plej granda nombro da burgoj kaj kasteloj en la lando. Vin atendas noblaj kasteloj, belegaj palacoj, funkciaj vilaoj. Nepre vizitindas UNESKO-heredaĵo Lednice-Valtice areo, nomata ankaŭ "Ĝardeno de Eŭropo", aŭ plia UNESKO Monda Heredaĵo: Vilao Tugendhat - perlo de Funkciisma arkitekturo. Kaj multe pli! La elekto estas ege riĉa, malfacilos viziti ĉiujn vidindaĵojn - sed vi provu!

### Kiel alveni?

La urbo Brno estas facile atingebla aŭte, buse, trajne, samkiel per aviadiloj. La urbo havas propran flughavenon kaj aldone proksimas tri pliaj: Prago, Vieno, Bratislavo. De la ĉefurbo Prago oni atingas ĝin aŭte en du horoj, buse aŭ trajne en tri.

### Brno, Ĉeĥio

Brno estas la dua plej granda urbo en Ĉeĥio, kun facile atingebla internacia flughaveno, kio ebligos senprobleman aliron por partoprenantoj el la tuta mondo.

La urbo ankaŭ havas bonan publikan transportan sistemon kaj la kongresejo situas proksime al ĉiuj gravaj hoteloj kaj turismaj allogaĵoj. Brno estas ĉarma kaj historie riĉa urbo.

Ĝi ofertas varman kaj akcepteman etoson kaj unikan atmosferon. Turismaj vidindaĵoj kaj gastamo de la homoj certe plaĉos al la partoprenantoj de la 110-a UK.

Bonvenon!

# Congrès du Benelux à Hasselt

# Raporto de la Beneluksa Kongreso en Hasselt

La Beneluksa Kongreso estas intertempe translime konata. Mi kiel germano do volonte partoprenis ĝin same kiel mi kutime faris dum la pasintaj jaroj (kun la pasinta jaro kiel escepto). Kaj ĉi-jare la partopreno estas eĉ pli facila: kun Hasselt la organizantoj elektis lokon tuj apud la germana limo. Sed kiel ofte en la vivo oni ne tro frue ĝoju: pro la situo de la belga regiono Limburgo, ŝirmita per geografia lango de Nederlanda Limburgo "kontraŭ" Germanujo, ni germanoj devas sufiĉe longdistance ĉirkaŭiri Mastriĥton por atingi la karajn urbojn Hasselt, Genk aŭ Houthalen-Helchteren, kie okazis la Beneluksa Kongreso antaŭ kelkaj jaroj.

Mi do ĉi-jare elektis aliri la kongresejon ne per publika transporto tra Aĥeno kaj Lieĝo, sed per aŭtomobilo. Tiel ne vere estis multe pli rapide, ĉar dank' al nova nederlanda leĝo oni nur rajtis veturi je cent kilometroj en horo, kio helikrapidigis mian vojaĝon. Ĝi estis des pli stresiga, ĉar mi ne volis maltrafi la plej gravan programeron de la vespero: adiaŭa festo de Nicky. Kaj mi rajtis transdoni donacan libron de mia germana amikino Helga Plötner, kiu faris specialan pentraĵon. La en la kongresa libro rekomendita publika parkejo, unu kilometron for de la kongresejo, estis okupita pro la loka kermeso: oni ne rajtis lasi min eniri. Mi do per Google Maps serĉis parkejon kaj trovis ĝin tuj apud la stacidomo, nome publika parkdomo. La ŝildo apud la enveturejo ofertis restadon kontraŭ dek du eŭroj po nokto kaj mi tion akceptis. Finfine estis multe pli, sed nu, ĉar mi estas estrarano de Germana Esperanto-Asocio (GEA) kaj ĉar mi oficiale reprezentis la asocion, finfine la GEA-trezoristo pagos ĝin.

### Nicky

Feliĉe mi venis ĝustatempe por la adiaŭa festo de Nicky, mi povis transdoni la donacon ĝustatempe kaj jen la ĝusta loko por refoje diri: "Dankon Nicky pro via multfaceta agado en la movado. Vi estas orplena trezoro por multaj homoj!" La resto de la vespero estis rekompenso por la streĉiga alvojaĝo: koncerto de Geomar same plibonigis mian humoron kiel la ĉeriza biero. Mi ja estas naskiĝinta Warstein-ano (urbo de konata germana biero)... do ne diru tion al miaj lokaj amikoj. La venonta tago estis sufiĉe komforta por mi: kiel matenmanĝo mi manĝis lokan molan panon (kiel germano mi devas diri tion), poste mi ĝuis prelegon pri la aktivecoj de la Verdaj Skoltoj. Poste

mi estis en la asembleo de BEF kaj miris kiom vigla la asocio estas proporcie al la malmultaj aktivuloj. Posttagmeze mi rezignis pri la oficialaj ekskursoj, bedaŭrinde por la organizantoj de tiuj ame preparitaj kaj – mi poste aŭdis – bonegaj aktivecoj. Senkulpigo, mi estas ankoraŭ laboranto kaj dum la semajnfino mi bezonas iom da ripozo. Mi do ĝuis la etoson en la urbo individue. Vespera programo estis la teatraĵo de Arno Lagrange, kiu scipovis imiti multajn karakterojn ene de unu teatraĵo.

Dum la dimanĉa antaŭtagmezo mi rapide iris al apuda nutraĵvendejo kaj aĉetis kelkajn lokajn frandaĵojn (belgajn vaflojn ktp.), ĉar mi bezonis donacon por amika rondo hejme. Poste mi partoprenis la asembleon de V.Esp-o, kun kiu GEA havos komunan kongreson en 2025 en la germana urbo Schleiden. Survoje reen mi kunportis Geomar-n kaj amikinon el Germanujo. Lastminute mi atingis mian hejmurbon Duisburg por ke Geomar atingu sian trajnon.

Dankon al la organizantoj, denove estis granda plezuro.

*Andreas Diemel,*
*Duisburg, Germanujo*



## Gebeneluksa Kongreso 2-5 okt. 2025

La venonta Beneluksa Kongreso estos komuna germana-beneluksa. Ĝin kune organizos Valona Esperanto-Asocio (V.Esp-o) kaj Germana Esperanto-Asocio (GEA). La kongreso okazos en Germanio, je 30 km de Monschau, proksime de la landlimo kun Belgio. **https://benelukso.eu/kongreso**

# 45 ans de « Movado sen Nomo »

# Movado sen Nomo 45-jara: festu kun ni

Movado sen Nomo strebas kontribui al pli bona mondo. Ĝi atentas pri gravaj aferoj kiuj ne rilatas al mono kaj materialismo. Anstataŭe, ĝi atentas pri feliĉo, sano kaj ekologio. Ĝi volas:

- Estigi pli bonajn interhomajn kontaktojn kaj solidarecon inter ĉiuj homoj, grandaj aŭ malgrandaj, riĉaj aŭ malriĉaj, de kiu ajn raso, deveno aŭ religio;
- Estigi internan pacon, forigi la izolitecon de homoj, redoni al ili la eble perditan kuraĝon, helpi al ili denove ekkredi je la vivo, la propraj eblecoj, la amo, la aliaj homoj;
- Pledi por pli da amo, paco, toleremo, justeco kaj respekto por ĉio vivanta kaj defendi ĝin.

Movado sen Nomo kredas, ke en ĉiu homo troviĝas bonecoj. Tiujn bonecojn ni volas malkovri kaj kultivi. Ni serĉas la bonan koron sub la vestoj de ĉiuj homoj. Tiun koron ni volas « tuŝi » (vivigi) kaj, kune kun tiu homo, serĉi novajn eblecojn, vivoĝojon kaj vivstilon. Por tion realigi, Movado sen Nomo eldonas levilkartojn kaj librojn kun inspiraj tekstoj.

Sabaton, la 25-an de januaro 2025, estos precize 45 jaroj post kiam la flandra pastro Phil Bosmans kunfondis la asocion Movado sen Nomo. Per Esperanto, lia mesaĝo povis disvastiĝi tra la tuta mondo. 12 jarojn post lia forpaso en la aĝo de 90 jaroj, grupo de entuziasmuloj daŭre vivigas liajn ideojn. Por substreki ĉi tiun jubileon, ni invitas ĉiujn "samideanojn" al komuna manĝo. **Kie**: Esperantodomo, Lange Beeldekensstraat 169, 2060 Antverpeno. **Kiam**: Dimanĉo, la 26-an de januaro 2025, je la 12h30. **Kio**: Poké-bovlo – manĝo, kie vi mem povas elekti kaj kombini la ingrediencojn laŭplaĉe. **Kosto**: 15 eŭroj (La enspezoj subtenas la agadon de la asocio.)

Ĉiuj homoj kun pozitiva sinteno estas kore bonvenaj ĉe ni!

**Aliĝo**: Per pago antaŭ la 23-a de januaro 2024 al: Movado sen Nomo aspc - BE75 9796 0877 6651. Via pago validas kiel aliĝo.



# Cotisations

# Kotizoj

## COTISATIONS POUR « ESPÉRANTO WALLONIE (V.Esp-o) » EN 2025

- **MEM : 30 € pour être membre adulte de V.Esp-o et recevoir la revue.**
- **JUN : 12 € pour les membres de moins de 25 ans pour les mêmes services.**
- **FAM : 5 € pour les membres de la famille, en soutien, sans recevoir la revue.**
- **REV : 15 € pour ne recevoir que la revue, sans être membre.**

**VIREMENT AU COMPTE IBAN : BE33 5230 8132 1946 de Triodos**

**de l'asbl « ESPÉRANTO-WALLONIE (V.Esp-o) »**

**NB : Indiquez les raisons du versement. Exemple : MEM+3xFAM = 45 €.**

*************************************************************************

**Pour soutenir nos actions, vous pouvez faire un don (exceptionnel ou régulier) à V.Esp-o.**

**Ou participer au FONDS INSTIGO : Compte BE25 9731 2584 2982 des « Verdaj Skoltoj ».**

**Vous pouvez aussi vous abonner à la revue "ESPÉRANTO-INFO" en versant 30 €,**

**au compte IBAN : FR91 2004 1 01 0 081 1 901 4 6B02 947 BIC : PSSTFRPPMAR.**

**Ou bien, éventuellement, au compte de V.Esp-o qui transmettra la demande**

# Camping des Scouts Verts

# Tendumado de la Verdaj Skoltoj en Ĉeĥio



De la 13-a ĝis la 24-a de julio 2024 okazis tendumado de la Verdaj Skoltoj en Mimoň, Ĉeĥio.

**Kio estas skoltoj?**
Skolto (scout) estas tutmonda junulara movado kiu celas kun-eduki infanojn kaj adoleskulojn.

**Kio estas la Verdaj Skoltoj?**
En 2012, en Belgio kreiĝis grupo da Esperanto-parolantaj skoltoj. Kelkaj adoleskuloj kaj unu plenkreskulo regule kunvenis por skoltumi en nia lingvo. Ĉar Belgio estas plurlingva lando, Esperanto estis la sola komuna lingvo. Ekde la komenco ankaŭ partoprenis germanino kaj franco.

La grupo kreskis iom post iom. En 2015 dank' al subteno de Esperanto-Valonio ni fondis oficialan asocion. Pli ol 10 jaroj poste, la grupo grandiĝis kaj internaciiĝis. Pro distancoj kaj manko de komunaj ferioj, ni nun organizas malpli da plilongaj eventoj. Nia ĉefa evento: la somera tendumado. En Mimoň ĉe-estis 25 skoltoj el Francio, Belgio, Germanio, Skotlando, Hungario, Pollando kaj Svislando.

**Kion ili faras?**
Lupidoj kaj esploristoj ludas, amuziĝas, lernas vivi kune, lernas elturniĝi en la naturo, helpas por kuiri, faras fajron kaj kuiras sur ĝi… Ni ankaŭ instruas al ili pli bone komuniki, pli bone koni sin mem, kaj kiel serĉi sian vojon en la vivo.

Estroj organizas la eventojn kaj gvidas la skoltojn.

Roveroj estas ia speciala grupo. Skoltoj provas plibonigi la mondon edukante la sekvontan generacion. Tamen

roveroj estas escepto: ili provas rekte plibonigi la mondon per siaj projektoj. Ĉar la Verdaj Skoltoj uzas Esperanton, niaj roveroj speciale fokusiĝas pri subteno kaj helpo al Esperanto-movado. Ilia granda projekto ĉi-jare estas organizado de Junulara E-Semajno (JES) en Belgio.

Ĉu vi konas infanojn kaj adoleskulojn kiuj ŝatus partopreni niajn eventojn? Skribu al ni! Sekvu niajn aventurojn ĉe Facebook, Instagram kaj nia retejo!

- *https://verdajskoltoj.net/*
- *https://www.facebook.com/verdajskoltoj*
- *https://www.instagram.com/verdaj_skoltoj/*

*Lupo*






## Ĉu ankaŭ vi venos al PEKO?

Kutimaj skoltoj organizas vespermanĝon por festi kun amikoj kaj gepatroj, kaj por iom enspezi. La Verdaj Skoltoj organizas kongreson de 3 ĝis 5 tagoj. PEKO iĝis LA kunveno en Belgio. NEPRE venu kaj invitu viajn amikojn, genevojn, genepojn, najbarojn, E-lernantojn… Komencantoj kaj familioj aparte bonvenas!

**Kiam?** De vendredo la la 16-a de majo ekde la 18-a horo, ĝis dimanĉo la 18-a de majo je la 14-a horo.

**Kie?** Centre d'Hébergement du Château de Tilff, Esplanade de l'Abeille, 9 4130 Tilff

Pliaj informoj: **https://verdajskoltoj.net/2025peko**

# Des films en espéranto

# Novaj filmetoj kaj profesia filmo en Esperanto

**Usona Bona Film-Festivalo**

Antaŭ nelonge la sesan fojon okazis la Usona Bona Film-Festivalo, konkurso por filmetoj en Esperanto. Grandan sukceson havas unu el la filmoj - *Mezuro*, kiu kaptis la atenton de la uzantoj ĉe Youtube kaj ĝis nun estis spektita pli ol 60 000 fojojn. En la ĉi-jara Usona Bona Film-Festivalo partoprenas 26 filmoj el pluraj landoj. La festivalo estas finance subtenata de Esperanto-USA, kaj la gajnantaj filmoj ricevas monpremiojn. Jam la duan fojon okazis ankaŭ ruĝtapiŝa premiero, laŭ la ekzemplo de grandaj filmfestivaloj. Estis ĝis nun entute 176 filmoj kiuj partoprenis en la ses festivaloj. La tuta longo de la filmoj estas preskaŭ naŭ horoj, se oni spektus senhalte! La filmoj de la ĉi-jara festivalo estas spekteblaj en aparta ludlisto en Youtube (vidu **https://mallonge.net/filmo6**).




Fonto: Libera Folio

**En Finnlando aperas profesia filmo en Esperanto**

”Patrinoj” estas nova, duonhora esperantlingva filmo, kiu nun pretiĝas en Finnlando kaj estos proponata por festivaloj de mallongaj filmoj dum 2025. La reĝisoro Anna Andersson elektis fari la filmon en Esperanto, ĉar la temo estas kontraŭmilita kaj ĉar ŝi volas, ke la okazaĵoj ne estu ligitaj al iu specifa lando.

– Kiam mi trovis Esperanton, io falis en la ĝustan lokon. Mi komprenis, ke ĝuste ĉi tio estas la maniero trakti ĉi tiun historion. Kaj kiam ni faris la mallongan filmon, mi rimarkis, ke ĉio efektive funkcias, kiam oni uzas Esperanton. Tio fortigis mian penson, ke vere oni devas fari el ĉi tio plenlongan filmon, rakontas la reĝisoro Anna Andersson al Libera Folio.

Ŝi mem ne scias Esperanton, kaj diras ke ŝi trovis la lingvon tute hazarde, kiam ŝi komencis plani filmon kun kontraŭmilita mesaĝo.

– Mi volis pritrakti kion milito kaj totalisma socio faras al homo. En la nuna momento okazas milito ankaŭ en Eŭropo, kaj tial ĝi tuŝas nin pli proksime ol antaŭe. Sed bedaŭrinde la militaj krimoj, kiujn ankaŭ en ĉi tiu momento Rusio okazigas en Ukrainio, ne estas io nova en la monda historio. Tial mi ne volis ligi la filmon rekte al la kunteksto de Rusio kaj Ukrainio.

Unue Anna Andersson planis ke la filmo okazu en ia malutopia, totalisma Finnlando en la estonteco, sed tio ne ŝajnis al si sufiĉe kredebla.

– Mi ekhavis vere bonan senton, kiam mi subite trovis Esperanton. Pere de ĝi mi konstruas novan realon, kiu ne estas io nun ekzistanta en la mondo. Tiel mi tamen povas pritrakti aktualajn, dolorajn demandojn pri tio, kion signifas vivi en totalisma socio. Kio okazas post jardekoj de cerbolavado, kiam sendependa pensado estas ĉiel malpermesita.

Post iom da serĉado en la reto Anna Andersson ekhavis kontakton kun Esperanto-Asocio de Finnlando (EAF).

– Mi volis vidi, ĉu estas ia Esperanto-agado en Finnlando, sendis retpoŝton, kaj tre ĝojiĝis, kiam la Esperanto-asocio



*La reĝisoro Anna Andersson dum la filmado. Foto: Lotta Lemetti*

entuziasmiĝis pri la ideo kaj volis kunlabori. Ni filmis dum aŭgusto, sed jam en la printempo komenciĝis tre aktiva reta korespondado. Mi estas ege danka al EAF kaj al Fondumo Esperanto pro tio, kiel rapide kaj malferme ili ekkunlaboris pri ĉio ĉi.

Fondumo Esperanto, kies bazan kapitalon donis la konata finna esperantisto Vilho Setälä, subvenciis la filmon per la sumo de 10 000 eŭroj.

Legu plu en Libera Folio: **https://mallonge.net/finna**

# Congrès en Afrique : rapport

# Pensu tutmonde, agu loke

*Ĉi-somere mi havis la ŝancon partopreni la 109-an Universalan Kongreson de Esperanto kiu estis organizita unuafoje ekde 1905 sur la afrika kontinento, en Aruŝo, Tanzanio. Tiel enhave riĉa kiel la antaŭaj, tiu ĉi kongreso estis neimageble dinamisma. Allogis min la juneco de la partoprenantoj. Ĝi verŝajne estas kongreso kie danco, kaj kulturo ĝenerale, plej ĉeestis. Resume, dum la reveno, mi imagis ke "mi metis tigron en mian motoron".*

### La kongreso

854 membroj el 65 landoj pritraktis la temon "Lingvo, homoj kaj medio por pli bona mondo." Partoprenantoj spertis modelon por pli bona mondo, kie tutmondaj civitanoj povas vivi kune en paco kaj komuniki sen tradukisto danke al la lingvo Internacia: Esperanto, kiun ĉiuj kongresanoj parolas.

Ili ĝoje konstatas, ke en Afriko la movado por neŭtrala internacia lingvo estas vigla; ke ĝi aktivas en multaj landoj de la afrika kontinento; kaj ke la afrikaj esperantistoj liveras valoran kontribuon al la universaleco de la tutmonda Esperanto-movado. Kun sama ĝojo la partoprenantoj observas, ke multaj junaj homoj en afrikaj landoj lernas Esperanton en kursoj kaj ke en multaj afrikaj landoj estas planite organizi pli da kursoj por ebligi pli da personaj internaciaj kontaktoj.

### Antaŭkongreso: Afrika Kongreso de Virinoj (AKVo)

Partoprenante en konferencoj kaj laborrenkontiĝoj, ĉirkaŭ sesdek virinoj montris, ke virinoj estas esenca levilo por daŭripova evoluo. Por antaŭenigi pacon, virinoj devas vivi en paco kaj certigi la pacon de tiuj ĉirkaŭ ili. Por atingi seksan egalecon, ili volas ŝanĝi, movi la sociajn kaj kulturajn barojn, kiuj malhelpas ilin aliri edukadon kaj kontraktan laboron. Fine, por certigi virinajn rajtojn kaj virinan potencon, estas esence agi por certigi sanon kaj respekton de homaj rajtoj por ĉiuj.

Post interŝanĝado de dancoj, kantoj, metiaj teknikoj, ili decidis rekrei virinan reton ene de la universala Esperanto-asocio, ĉar Esperanto estas ne nur lingvo sed ankaŭ ilo por egaleco kaj emancipiĝo.

### Protektado de la medio, rekono de la masaja popolo

Turismo laborigas 10% de la populacio kaj reprezentas 10% de la MEP Malneta Enlanda Produkto de Tanzanio. La Kongreso estis atenta al la masaja popolo, kies loko en Tanzanio estas speciala. Daŭre nomadaj, la masajoj sekvas siajn gregojn laŭ la disponeblaj paŝtejoj. La politika volo

fiksi ilin en iu loko kaj trudi al ili regulojn pri teruzo kolizias fronte kun ilia vivmaniero. Ankaŭ la Esperanto-kongreso zorgis dum sia malfermo kaj fermo inviti reprezentantojn de la masaja popolo. Dum la fermo, masaja estro donacis al la prezidanto de UEA ĉefbastonon, invitante lin informi pri la venontaj Esperanto-kongresoj, kaj konigi siajn gvidajn konsilojn kun la masajoj.

Ĉu viziti aŭ ne la naturajn parkojn submetitajn al demografia premo kaj la intensiĝo de agrikulturo? Ŝajnas, ke la masajoj respondecas pri protektado de malnomadaj kamparanoj kontraŭ leonoj, tigroj, elefantoj ktp, resume, la 5 grandaj mamuloj protektitaj kaj en risko de formorto ĉar ilia vivmedio, ilia vivspaco, malaperas. Ni ne evitos la amasan formorton, kiu komenciĝis, se ni ne dividas nian planedon certigante la konservadon de la medioj.

## Flanke de la kongreso: projektoj pri agrikulturo kaj permakulturo subtenataj de la Pacinsuloj

Agrikulturo en Tanzanio ankoraŭ okupas pli ol 60% de la aktiva loĝantaro, sed nur triono de plugebla tero estas kultivita. La registaro fiksis al si la celon pliigi produktivecon en agrikulturo por la malgrandaj agrikulturaj produktantoj, kiuj konsistigas la plimulton de farmistoj. Pro manko de rimedoj, Tanzanio establis kunlaborajn ligojn kun Ĉinio, kiu provizas financadon per sia disvolva banko, agrikulturajn kapablojn kaj stud- kaj trejnado-eblecojn. Bedaŭrinde,



programoj de disvolviĝo de industria agrikulturo, kvankam ili alportas valutojn, estas akompanataj de uzo de insekticidoj kaj sintezaj sterkoj same kiel patentitaj semoj, kaj konkuras kun agrikultura subtena agrikulturo, kiu akcelas senarbarigon kaj endanĝerigas la nutraĵan ekvilibron.

La neprofitcela organizaĵo "Pacinsuloj" en Huy subtenas reton de lokaj kamparanaj kooperativoj en Tanzanio, kiu antaŭenigas permakulturon, la protekton de lokaj semoj kaj donas prioritaton al manĝkultivaĵoj. Mi povis konstati, ke la opozicio de interesoj inter la agronutra industrio kaj lokaj

kamparanoj, la defio adapti kultivaĵojn al klimata ŝanĝiĝo, la transformo de konsumkutimoj rilatas al la samaj logikoj ĉi tie kaj en Tanzanio, eĉ se la demografia kaj soci-ekonomiaj kondiĉoj estas tre malsamaj. Hakuna matata! Neniu problemo! Diris la tanzaniaj kongresanoj… Kaj ofte ili aldonas… Kune, ekzistas nur solvoj.

**Minoritataj lingvoj, la svahila kaj Esperanto**

Se vi demandas en Valonio kiom da lingvoj estas parolataj, homoj, kiuj parolas ĝin, ne ĉiam mencias la valonan. Same, se ni demandas afrikajn studentojn, kiajn lingvojn ili parolas, ili respondas la anglan, francan, hispanan (lingvoj de la ekskolonianto), svahilan, sed ili forgesas mencii siajn proprajn lingvojn, tiun de siaj lulkantoj kaj de la lernejo kie ili estis kleraj, ili lernis legi (nyamwesi, hehet, makonde, nyakusa, choaga, luguru, shambala, ktp). Ĉi tiu fakto estas malmulte konata, sed la plej multaj afrikanoj estas plurlingvaj. Ili mem ofte ignoras aŭ kaŝas tiun ĉi kulturan riĉecon, kiun ne aprezas tutmondiĝo: por antaŭenigi sian scion, oni devas antaŭ ĉio majstri la anglan, aŭ pli ĝuste la Globish.

Kvankam la svahila estas la gepatra lingvo de nur 8,8% de tanzanianoj, kongresanoj konstatis kun kontento, ke la svahila lingvo funkcias kiel supernacia lingvo, ebligante kontakton inter loĝantoj de pluraj ŝtatoj de la Komunumo de Orienta Afriko (EAC) sen neceso uzi la lingvon de iamaj koloniaj imperioj. Ĝi ĝuas la statuson de nacia kaj oficiala lingvo en Tanzanio, nacia lingvo en Kenjo kaj la Demokratia Respubliko Kongo. La svahila estas la '*lingua franca*' en Ugando, Ruando, Burundo, norda Mozambiko kaj, ankaŭ iomete en Malavio, Zambio kaj suda Sudano.

"Ankaŭ ĉiuj aliaj afrikaj lingvoj meritas esti subtenataj kaj necesas rekoni la lingvajn rajtojn de siaj parolantoj, precipe en baza edukado, konforme al la rekomendoj de Unesko. Ĝi estas la bazo de paco, de pli bona mondo." Partoprenantoj citis Nelson Mandela: "Edukado estas la plej potenca armilo, kiun ni povas uzi por ŝanĝi la mondon" kaj la unua tanzania prezidanto Julius Nyerere, kiu atentis la enhavon de edukaj programoj kaj precipe subtenis legopovon en lokaj lingvoj kaj la uzado de la svahila.

Same kiel internacia referenca valuto devus esti sendependa de ĉiuj naciaj ligoj, por tutmonda interkompreniĝo estas nepra komuna kaj neŭtrala internacia lingvo, kiun ĉiu povas paroli krom sia gepatra lingvo. La partoprenantoj konstatis kun fiero, ke Esperanto perfekte taŭgas por tiu ĉi celo. En unupolusa mondo ne ekzistas dialogo, sed en multpolusa mondo dialogo estas nepra kaj Esperanto permesas dialogon inter egaluloj.

Intertempe mi vidis la filmon "Io Capitano", kiu montras la teruran migran vojon de 2 junaj senegaloj al Sicilio. Kiam oni pensas pri la migradoj tra la mondo, tio plifortigas mian la ideon, ke ni devas pensi tutmonde kaj agi loke, kaj ke ni devas rapide ŝanĝi la regulojn de ekonomia, socia kaj kultura interŝanĝoj, se ni volas pluvivi.

*Eric Nemes*

V.Esp-o dispose d'une bibliothèque de plus de 1700 livres à Cerfontaine. Elle est visitable sur rendez-vous chez le bibliothécaire Claude Glady.
Renseignements : cglady@arcadis.be

## Rencontres et cours réguliers :

**Charleroi - https://esperanto.be/charleroi**
Centre Culturel, rue du Château 3 - 6032 Mont-sur-Marchienne. Pour y participer: Michèle Villers michele.villers@hotmail.com

**Eghezée** Jean Annet - jean.annet@gmail.com
0495 10 32 30

**Huy** Philippe Draize - philippedraize@yahoo.fr

**Liège - https://esperanto.be/liege**
Eric Nemes - eric.nemes@gmail .com
0494 230 234

**Namur** Cours à l'UTAN tous les vendredis à 13h30. Jean Annet jean.annet@gmail.com

## Tables de conversation :

**Liège**
Chez « Toutes directions ». *Infos* : 04 262 20 64 - https://mallonge.net/td

**Louvain-la-Neuve**
Catherine Royaux cat.royaux@netcourrier.com

# Ĉu vi volas lerni Esperanton?

## Venu al nia studsemajnfino en Ipro

Studsemajnfino en Ipro de 21 feb. 2025 vespere ĝis 23 feb. 2025 posttagmeze.
Ni celas:

- komencantojn
- progresintojn
- plenlernintojn

La kotizo estas malalta!




Aliĝilo kaj pliaj informoj: https://esperanto.be/best

## Autres personnes ressources

- Jeunes et initiation : Valère Doumont 0485 517 552 doumontvalere@yahoo.fr
- Cerfontaine : Claude Glady 071 64 49 16 cglady@arcadis.be
- Comines-Warneton : Jean-Claude Thumerelle - jcthum@gmail.com
- Lobbes : Jean-Pol Sparenberg 0475 272 319 jpsparenberg@brutele.be
- Plombières : Bernadette Poncelet, bernadetteponcelet@skynet.be

## Voulez-vous apparaître dans cette liste ? Contactez-nous !

# L'espéranto c'est dans la poche

Cette brochure est une bonne base pour commencer à apprendre l'espéranto. Cette langue internationale s'apprend plus facilement que les autres du fait de sa grammaire logique et de son système pratique de construction des mots.

Découvrez d'abord l'espéranto dans la première partie et faites ensuite les exercices de la deuxième partie. À chaque leçon de grammaire correspond un exercice. À raison d'une leçon par jour, vous pourrez au bout d'une semaine comprendre un texte simple et faire quelques phrases.







**Recevez cette brochure gratuitement !**

**- via notre site : esperanto-wallonie.be**

**- communiquez votre adresse à esperanto.wallonie@gmail.com**

**- envoyez vos coordonnées par sms au n° de tél : 0485 51 75 52**

BELGIE(N) - BELGIQUE
PB-PP
bpost

P001014
Lobbes
6540-dépôt

Editeur responsable: Jean ANNET
V. Esp-o : rue de la Terre Franche, 31 - 5310 Longchamps
Exp : Jean-Pol Sparenberg
Ruelle de Thuin, 20 - 6540 Lobbes